

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 385</i> <i>nov. / 2023</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <a href="http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm">http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm</a></p>		

## Tiberio Madonna (Italio)



### Verdo

Verdo.  
La kolor' de la naturo.  
Kia bela afero  
kun folioj, herbejoj, akridoj  
kiuj komunikas  
sian freŝecon kaj sian vivecon  
sian gajecon  
per brilego, odoroj, movoj  
per lingvo universala  
kiel Esperanto.

Verdo.  
La koloro de Esperanto.  
Kia bela lingvo  
riĉa kaj facila  
kiu komunikigas  
per malgranda regularo  
la popolojn de l' homaro  
en la monda Babelo  
en la lingva pelmelo  
ja tute nature.

Verdo.  
La koloro de l' espero.  
Kia bela sento  
fariga kaj konstruiga  
kiu inspiras kaj instigas  
kiu ĉiam nutras  
la flamon de l' optimismo  
kaj noblajn idealojn  
sekvindajn, amindajn  
tute realigindajn.

Verdo.  
La koloro de l' envio.  
Kia bela sento  
fariga kaj detruiga  
kiu blindigas kaj instigas  
kiu ĉiam nutras  
la fajron de l' malamo  
kaj malnoblajn agaĉojn  
faratajn, refaratajn  
abomene favoratajn.

Verdo.  
La koloro de l' veneno.  
Kia bona trinkaĵo  
nutra kaj gustoplena  
kiu toksas kaj mortigas  
kaj ĉiujn detruas  
de ilia internaĵo;  
la neevitebla konsekvenco  
de l' envio detruiga,  
de l' malamo difuzita.

Verdo.  
La kolor' de ĉio ĉi.

## Ángel Arquillos (Hispanio)



### Mi pardonpetas

Ĉar mi provokis viajn larmojn,  
mi pardonpetas,  
eble pro tio mi ankaŭ  
kaŝe ploretas.  
Se vin ĝenis miaj krioj,  
mi pardonpetas,  
mi kriegis pro la timo,

sen deteno,  
pro via onta foriro.  
Pro tio kaj nur pro tio  
mi pardonpetas.

## Moissey Bronshteyn (Rusio)



Iam mi laboris sub ter', do  
ne tro dorlotata destine,  
ne imagas vivon en merdo,  
nek en marĉa koto,  
ja mi ne  
nepre abomenas ĉi ĉion,  
sed preferas duron de karbo  
kaj sinceran revelacion  
kaŝas en la grizo de l'barbo,  
kaj sen ajna timo alfrontas  
defiaron de la fortuno,  
ĉar impeto nova min spronas  
agi en la vivo-aŭtuno.

\*\*\*

En kompanio de aktoroj  
ĝuante guston de l'biero,  
pli pace batas mia kor' ol  
aliterene sur la Tero.

Enestas do viviga ĉarmo  
en la biera bobelado  
min ekscitanta ĉiam, ĉar mi  
ĝin opinias ĉefa plado

por babilado bonhumora,  
por parolemo plensufiĉa –  
jes, en la kompani' aktora  
mi, certe, sentas min feliĉa.

Nun, en la grizo de l'rutino,  
dum trotetad' de l'tempo lama  
ĉeestas brando, vodko, vino,  
sed la efik' ne estas sama...

\*\*\*

Dum ir', inter vanteco kaj sankteco

serĉante ĉiam padon kompromisan,  
ne certas pigra pens' de homa speco,  
pro la hezit' elektas vojon misan,

kaj, misvojinte ĉe la starta punkto,  
konvinkas sin pri pravo de l' elekto  
kun em' forgesi ke ne eblas nun do  
iu alia solvo ol neglekto

de agoj preferotaj ĉe bezono –  
trompetoj aperantaj sen rimorso,  
kaj ne atenti, ke por propra bono  
la honestec' perdiĝis trans la dorso.

## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Batadas en la kapo strof' de poezio  
“Patrujo estas la popolo mia”,  
Ĉielo, tero vidas ĉion—  
Suferoj, mortoj kaj malĝoj' senfinaj.

Silent' grandega akompanas  
La “pandemion” de surdeco kaj blindeco  
Milito kun infanoj kaj aĝuloj  
Prapatroj mutaj nur “demandas” posteulojn.

Kursavas sin popolo dum jarcentoj  
“Okuloj de armenoj ĉiam tristaj”,  
Pleniĝas nova “urbo” en la urbo  
De pereintoj karaj kaj senkulpaj.

Stultulo juĝas, ne komprenas malsaĝuloj  
La ĉenon de eventoj ĉiuj,  
Grandiĝas voj' de rifuĝintoj  
De la Patrujo al Nenio.

La malamik' ekstera kaj interna,  
Pardonu nin, gefiloj karaj,  
Vi ne ekscios, ke suferoj  
Mortigis ĉion, veron, la esperon.

Bruliĝas ter', militas homoj,

Kaj unu eta land' en mondo  
Nur pacon revas, revas pacon  
Sur sia ter' severa, monta.

Stultuloj juĝas kaj ne scias,  
Ke lando simple volas Vivi,  
Ripetas kor', animo, lipoj  
"Patrujo estas la popolo mia"...

## Wally du Temple (Kanado)



### Sciura Aŭtuno

Sciuro!  
pufa vostego  
tremblas,  
per buŝo  
je manetoj fosantaj—  
bankumas  
brunan nukson  
sekrete, me,  
ago aŭtuna  
Ardea Restaŭracio  
longkrura  
ardeo bluas  
statue staras  
en travidebla  
restaŭracio estuara  
atendante  
alvenon de  
menua deziro.



## Yohanes Manhitu (Indonezio)



### Poezion oni devas verki

"Poezio komenciĝas per revo kaj finiĝas per  
liberigo."

*Mohammad-Ali Sepanlou\**

Poezion oni devas verki  
kiam la koro estas pura

kaj la brusto estas varma.

Poezion oni devas legi,  
neniam devas ĝin kaŝi.  
Ĝi devas ĉiam vivi.

Poezio estas akvo disverŝanta  
de la koro kaj de la animo  
serĉanta vojon por eliri.

Poezio estas bona frukto  
de la arbo plej fruktodona  
surverŝata kun akvo benata.

Poezion oni devas tuj verki  
por porti la veran lumon  
kiam la mallumo alvenas.

\* *Konata irana poeto*

## Ardo (Ĉinio)



### Kaŝita vundo

Kaŝita malĝojo  
kiel sennombraj tentakloj  
trafante min  
kaj tiru min  
al la mondo  
kie pluvas kontinue

kiel inko la pluveroj  
Do mi estus la papero  
Gut'...gut'..., jen pluveroj  
Ĉiuj estus kiel larmoj  
kiujn oni ne povas forviŝi

## Erika Godó (Hungario)



### Somera pluvo

La suno brilas kaj la pluvo venas,  
kaj mallumo venas anstataŭe.  
Kiu restis ekstere, estas tre kuraĝe,  
ĉar la vento kunportas la malvarmeton.

Mi ankoraŭ sentas la varmon,  
 Sed jam tre gutas ekstere.  
 Mi rigardas tra la fenestro kaj vidas ĝin,  
 la tuta urbo mallumiĝis.  
 La pluvgutoj dancas sur la fenestro,  
 mi silente aŭskultas ĉi tiun belan melodion.  
 Homoj staras sub la tegmento,  
 dum pluvas, ili ne malsekiĝas.  
 La ĉielo estas blua post ŝtormo,  
 ankaŭ ili daŭrigus ielajn aferojn.  
 Sed ili rigardas supren al la ĉielo,  
 kaj ĉielarko brilas al ili kun multaj koloroj.  
 Kelkajn minutojn kaj ĝi estis finita,  
 kaj la ĉielo brilas blue denove.

### Hans-Georg Kaiser (Germanio)



## SOMERA IDILIO

La suno estas varmega,  
 sed ne tro.  
 Du knaboj metis lignan tablon  
 el la mebloj de avinjo  
 en la ĝardenon antaŭ la domo,  
 sur la herbejon,  
 ĉe la ombrobrando  
 de la granda nuksarbo.  
 Nun ili ludas kartojn  
 ĉe tiu kvarangula tablo.  
 Ili sidas kontente  
 en kurtaj ledopantalonoj  
 kaj kvadratitaj ĉemizoj.  
 La vakeraĵn ĉapelojn  
 ili leĝere ŝovis postkapen.  
 Nigra kato atentas,  
 ke neniu trompludu.

La limonadoglasoj de la knaboj  
 brilas kiel diamantoj,  
 kaj en la blua ĉielo  
 promenas nubofamilioj.

Ĉiuj formikoj,  
 kiuj perdis la vojon,  
 povas ankoraŭfoje

savi sian vivon,  
 ĉar aŭtentika vakero  
 ne murdas senkulpajn formikojn.

El la kasedomagnetofono  
 perlas gajaj notoj:  
 I came from Alabama  
 with my banjo on my knee ...

*majo de la jaro 1988*

## Estu mojosa!

Mojosu ĉe l' starto,  
 je ĉies bonfarto.  
 Senbride eĉ ridu,  
 mojose ekfidu!

Mojos' vin jam gloros,  
 se hom' vin adoros;  
 ĉielen vin levu,  
 mojose ekrevu!

Artistoj scivolos,  
 kamufle eĉ rolas.  
 Artistoj protestas,  
 per mok' manifestas.

Mojosa vivarto,  
 vin helpu ĉe l' starto.  
 Mojosu laŭveste  
 leĝeru dumfeste.

Ekhisu la velojn,  
 ne lasu la celojn.  
 Vi belu kaj dancu,  
 mojose avancu.

Desper' nin konsternas,  
 sed ĝojo eternas.  
 Mojoso instigas,  
 la vivon beligas.

Mojoso modernas  
 kaj tamen eternas.

Mojosu, vivanto,  
por ĉiuj kun kanto.

Mojosu, ĉar gravas,  
ke homoj nin ravas,  
ĉar sen iluzio  
ni estus nenio.

Mojosu vivarte  
por ĉiuj bonfarte.  
Senbride do ridu,  
mojason vi fidu!

### Jadranka Miric (Serbio)



## Ankoraŭ Aŭtunas

Grize tagiĝas.  
Frua aŭtuno.  
Malvarmas sen suno.  
Tre rapide vesperiĝas.  
Malofte pluvos,  
laŭ veterprognostoj  
estos pilongiĝado de Oktobra somero.  
Pacan maron al maristoj!  
Laŭlonge de stratoj  
falinta foliar'  
en venta mortobrakumo .  
Malgaja dancanta par'.

### Elena Popova (Bulgario)



## Demandoj

Ĉu vi parolis  
kun birdoj ekflugantaj  
al longa voj' sen kantoj?  
Ĉu kun vent' vi parolis?  
Kun helik' sur herbero?  
Ĉu vi trovis somere  
juvelon en l' roseroj  
kaj larmojn post prujno?  
Ĉu malkovris vi belecon  
en la araneaĵoj?

Kaj tristecon en la  
aŭtuna sternaĵo?  
Se ne, ĉu vi vivis vere  
sur nia bela Tero?

## Muzikanto

Ĉu ludas por li steloj  
nokte per violoj,  
aŭ kantas la anĝeloj  
en la ĉielo vole?  
Ĉu marondoj tamburas,  
muzikas laŭvere,  
aŭ per flutoj susuras  
por li la riveroj?  
Kun birdoj kaj vento  
ĉu li ŝvebas libere,  
kie ĉiumomente  
sonas la ĉielsferoj?  
La talent' eksentas  
kaj pianas sincere.

### Petro Palivoda (Ukrainio)



## Mimetismo

(kantteksto)

Vi estas ploro,  
se mi ploras,  
vi estas rido,  
se mi ridas,  
vi estas morto,  
se mi mortas,  
vi estas vivo,  
se mi vivas.

Vi estas ploro,  
vi estas rido,  
vi estas morto,  
vi estas vivo.

Mi ploras,  
mi ridas,

mi mortas,  
mi vivas.



## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



# FLUGILOJ DE AMO

Ĉirpas orioletoj frumatene  
dolĉaj en-ĝardene  
kaj unisone kun susuro de mildvento  
el oriento.

Kveras hirundoj dumtage  
viglaj super-lage  
kaj unisone kun lirlado de akvfluo  
kun plena ĝuo.

Trilas fringeloj vespere  
bravaj tutlibere  
kaj unisone kun flirtado de nubaro  
super maro.

Rukulas najtingaloj noktomeze  
sorĉaj kor-karese  
kaj unisone ja kun mia zumo  
en bano de lunlumo.

La birdoj kun flugiloj de amo  
kantas unisone kun la versdeklamo.

## Papilio

Jen eta papilio, sidanta kviete sur floro,  
zorgeme sur mia mano mi prenis ĝin.  
Sed mi sentis ĝian tremon kun humoro,  
kaj denove liberigis ĝin,  
vokante al ĝi: flugu al la lando bela!

Senlandlime estas vi libera,  
kaj ankaŭ neniu haltigos vin.  
Vi estas tiel leĝera,

flirtante kun spiro de venteto.

Mi estis iomete ĵaluza,  
tiel ĝi forflugis sen skrupulo.  
Kaj mi tiom multe bondeziris,  
ke mi ankaŭ eblus flugi laŭ postulo.

Papilio, Papilio, Papilio!  
Forflugu kun mia tuta amo,  
en ĉies koron portu la fajrero de espero,  
lasu homojn vivi denove feliĉe kun  
libero!

Papilio, Papilio, Papilio!  
Mi ŝatus esti kiel vi ja sen anksio,  
flugi trans landlimoj kaj muroj kun  
vento.  
Kaj vi tion ja kapablas,  
ke ni ĉiuj iĝas ĝojaj kun kontento.

Mi vidis ĝin laŭ mia mensimago,  
flugi super tero kaj maro dum vago.  
La homoj rigardis ĝin kun amika  
ridmieno,  
ili ĉesis kvereli kaj kriis: papilio,  
kiel vi ni ĉiuj ŝatus vivi sen ĉagreno!

Ĝi vidis tulipkampojn de Holando  
kaj la rozojn en Versajlo.  
Miozoto floris jen en Germanujo,  
blua floro de espero en Anglujo,  
kaj papavo ruĝa en Ateno,  
ĉiuj floroj de la mondo kun sunbeno!

Papilio, Papilio, Papilio!  
Mi vidis subite ombron kun defio:  
nigra birdo svingis jen malsupren,  
sed amiko mia flosis ja nedifektita for,  
ho bonŝanca, papilio!

Mi deziras forte iam:  
ke mi estus kun vi ĉiam,  
kaj ni flugu for, papilio!

— *Elgermanigis Yi Qiao (unufoje aperis en la retgrupo Litera Turo kun video 26.06.2023)*

## Donika Dabishevci



# Ne ŝrumpigu!

Malbonulo, vi..!

Kial vi tristas  
Plombe peza pro la silento?

Suneca mi ja estas  
Ne nigra malbeno.

Nekonata povas esti  
Nur la momento kiu oferis  
Ĉi tiun sovaĝan allogon,  
Freneze profundan.

Kial vi timetas?

Iutage, nek vi, nek mi,  
Ne plu ekzistos,  
Ni perdiĝos,  
Ni malestiĝos.

Vi turniĝos al marĉejo,  
Mi al la vulkana lavo,  
Vi al impetanta torento,  
Kiam mi brilos kvazaŭ ĉielarko,  
Kvazaŭ ĉielarko multkolora, ĝojplena!

Ne ŝrumpigu,  
Eksplodu, kvazaŭ sanga ŝpruco!

Lumigu mian koron,  
Flamigu mian korpon.  
Kaj jes: la Lipon!  
Malforta estaĵo deziranta la preĝon:  
La Lipon!



# VI EKFALOS

Vi povas konfuziĝi embarase,  
Kiam mi vin flirtos  
Sed la papilioj, ĉirkaŭ la kapo, vin kaptunos  
Vi menskaŝe allogiĝos  
Vi ekfalos  
Kvazaŭ rompita kastela ŝtono  
Malsupren laŭdeklive vin mi lanĉos  
Ruliĝanta...

Rigardu la lipojn miajn, sekiĝintajn  
Por la tuta ĉi tiu soifo mi demandas elpagon  
*Elalbanigis*



**Bardhyl Selimi**  
(Albanio)

# El Ĉina Antikva Poezio

Wu Wenying (1212?-1274?)

—laŭ melodio *Vento inter pinoj*

Qingming-feston mi pasigis sola,  
aŭskultante al pluvbato kaj ulula vento.  
Mi ne emas skribi la epitafon  
por falintaj floroj jen en ĉi momento.  
Antaŭ l' domo regas verd' malhela,  
tie ni disiĝis kun domaĝa sento.  
Ĉiu salikvergo nutras l' amon  
inter mi kaj ŝi kun vera sentimento.  
En printempa frido drinkas mi por  
varmo.  
Ĉe fruamaten' min vekas bird' el ŝonĝa  
tendo.

En ĝarden' uesta mi balaas ĉiutage  
la falintan ruĝon kaj ankoraŭ ĝue  
spektas novan scenon de  
malfruprintempo.  
Ofte vespoj flugas al pendola ŝnur' algue  
pro parfum' restanta jen de ŝiaj manoj.

Mi tre ĉagreniĝas, ke ni rendevue  
povas ne kuniĝi kiel du ambirdoj.  
Sur malplena la perono ja senbrue  
tra la nokt' kovriĝas musk' jam frue.



Wen Jiweng (?-?)

## Ekpenso ĉe l' Okcidenta Lago

—laŭ melodio *Gratulo al novedzo*

Nur malgranda lago restas  
el la okupita regn' mamuta.  
Post transiro de Jangzio  
transloĝiĝis la kortego tuta  
ĉirkaŭ l' lago kiel rezidejo.  
Tra cent jaroj ili spektas dancojn ĝue,  
tra cent jaroj ili dronas en drinkad' ebrie.  
Tamen en ĉefurbo kuriozaj ŝtonoj  
kaj trezoroj jam ruinigitas agonie,  
en palac' eĉ kreskas herboj kaj grenplantoj  
skuiĝantaj en nebula brumo.  
Ne ekzistas plu fidelaj korteganoj  
kiuj ja konsilas al la reĝo kun plorzumo.  
Nun sur la lag' boatoj flosas  
kun diboĉaj kantoj kaj muzikoj plene.  
Kie do troviĝas la bravuloj  
kiuj ĵuras ja defendi regnon pene?  
Kiam oni povos preni la perditan teron  
kaj l' rankoron venĝi jen solene?

Mi dum tuta vivo kovas ambicion  
savi regnon kaj l' popolon vere.  
Tamen tiaj korteganoj, kiaj ja fidelis  
al la regno, ne plu reaperos kunespere.  
Do, de kiuj la aferoj ŝtataj ja dependas  
por defendi kaj riĉigi sinofere?  
Kontraŭ l' malamiko ni rezistas  
nur per unu rivero—tre danĝere!  
Oni eĉ deliras, ke l' rivera feo

povas bari l' malamikon ja venkplene.  
Mi demandu tiujn mensogulojn:  
ĉu vi ne eksentas honton jen senĝene?  
Vi nur konas aprecadon al prunfloroj,  
sed ne povas peli dubon kompetente.  
Nun finfine mi jam scias, ke la sorto  
de la regno estas nesavebla ja lamente!

Liu Chenweng (1232-1297)

## Improvizajo ĉe fruaŭtuno

—laŭ melodio *Luno super okcidenta rivero*

Luno malleviĝas, sun' leviĝas,  
steloj jen moviĝas same en naturo.  
En la homa mondo gejunuloj  
ĝoje ludas kun plezuro.  
Ĉie homoj je duobla-sepa nokto\*  
novan veston jen surportas bonhumore.  
Kvazaŭ en paradizo ili ĝoje ludas  
kaj dancante kaj kantante ja elkore.

En la nokto fruaŭtuna mi eksentas  
fridon pikan kiel akv' nerimarkite.  
Mi sopiras al la okupita regno,  
ke hararo mia grizblankiĝas malrapide.  
Songe mi profunde sinkas al marfundo  
kaj esploras ŝanĝiĝemon de la tero,  
soren sur ĉielon mi satrigardas  
venton kaj la ondojn sur galaksia sfero.

*\*Duobla-sepa nokto estas la sepa de la sepa monato  
laŭ la ĉina lunkalendaro, dum kiu oni, precipe  
gejunuloj, festas la renkontiĝon de la geamantoj  
Bovpaŝtisto (Altairo) kaj Teksistino (Vego) laŭ la  
ĉina legendo.*

Liu Chenweng (1232-1297)

## Sento en printempo

—laŭ melodio *Verdas salikpintoj*

Militĉevaloj, kun kiraso fera  
kaj fel-kovrilo, trotras en la strato.  
Lanternoj nun disverŝas  
radiojn kvazaŭ per larmeca miriado.



Printempo same venas al la urbo,  
kie ĉargeno regas sen kompato.  
El flut' tartara ŝvebas ekzotaj sonoj  
kaj ankaŭ teatraĵoj je malŝato  
de ni popolo disonancas strange,  
ne oreplaĉe plu en fuŝa stato.

Vizaĝe al flagranta olelampo,  
mi sidas sola kun enuo.  
Sopir' alportas min al la hejmlando  
kun brila luno en lumfluo.  
Iame la ĉefurb' prosperis,  
sed nun jam decadencis kvazaŭ en vakuo.  
Kvankam mi vivas en la monto nenifare,  
mi tamen kovas rezistemon jen sen bruo,  
samkiel batalantaj popolanoj ĉe marbordo  
jen kontraŭ invadantoj decideme ja sen skuo.

*Elĉinigis*



**Vejdo (Ĉinio)**

**Wang Wei ( 693-761)**

*Memore al fratoj en oriento de la  
monto okaze de Duobla Naŭa Festo*

kiel fremdul' soleca en la fremda loko,  
mi pli sopiras al parencoj en la festo.  
ĉu fratoj grimpas sur monteton eĉ hodiaŭ  
kun la kornusoj? mi bedaŭras pro mia  
foresto.

*Elĉinigis* **Ardo (Ĉinio)**



**Zhuangzi**

**ĈAPITRO TRIDEK-TRIA**

**Sub la ĉielo**

§33-08

Huizi pensis, ke tiuj ĉi opinioj meritas grandan konsideradon en la tuta mondo. Li vojaĝis ĉien por disvastigi kaj lumigi tiujn ĉi temojn inter la dialektikistoj. Tiuj, kiuj amis

argumentadon, trovis grandan plezuron en la diskutado pri la jenaj temoj:

La ovoj posedas en si plumojn.

La koko havas tri piedojn.

Ying, la ĉefurbo de la regno Chu, entenas la tutan mondon.

La hundo povas esti nomata kapro.

La ĉevalo povas esti ovonaska.

La rano havas voston.

La fajro mem ne estas varma.

La monto havas buŝon.

La rado de veturanta ĉaro ne tuŝas la teron.

La okuloj ne vidas.

La ideo ne povas atingi la objekton; eĉ se ĝi povas, la atingito tamen ne estas la objekto mem.

La testudo estas pli longa, ol la serpento.

La ortilo ne povas fari kvadraton; la cirkelo ne povas fari cirklon.

La mortezo kaj la tenono ne povas perfekte alĝustiĝi unu al la alia.

La ombro de fluganta birdo neniam moviĝas.

La fluganta sago havas momentojn de halto kaj momentojn de moviĝo.

La hundido ne estas hundo.

Unu flava ĉevalo plus unu nigra bovo faras tri.

La blanka hundo povas esti nomata nigra hundo.

La orfa ĉevalo neniam havas sian patrinon.

Se ĉiutage oni duonige tranĉas la bastonon longan je unu ĉi-o, la tranĉado neniam venas al la fino.

Tiuj, kiuj amis argumenti pri tiuj ĉi propozicioj, fervore diskutadis kun Huizi, kaj la diskutado daŭris senkonklude dum ilia tuta vivo.

§33-09

Kvankam tiuj dialektikistoj lertis en diskutado, Huan Tuan, Gongsun Long kaj

iliaj similaj, havis ankaŭ sian limigitecon. Ili povis trompi homojn portempe, ŝanĝi iliajn ideojn, fermigi al ili la buŝon, sed ili ne povis konvinki ilin. Huizi pasigis siajn tagojn diskutante kun siaj kunparolantoj kaj fabrikadis la supre diritajn paradoksojn por embarasi la dialektikistojn de la tuta mondo.

Plie, Huizi rigardis sin kiel geniulon kaj senfine paroladis svingante sian lertan langon. Li eĉ dube diris: “Ĉu vere grandaj estas la ĉielo kaj la tero?” Li deziris superi ĉiujn siajn kontraŭulojn, tamen li ne vere komprenis la Taŭon.

Iu strangulo el la sudo, kiu estis nomata Huang Liao, demandis Huizi, kial la ĉielo ne falas kaj la tero ne malleviĝas? Li ankaŭ petis lin klarigi, kiel estiĝas la vento, la pluvo kaj la tondro. Huizi respondis tiujn ĉi demandojn senhezite kaj senpripense. Li eksplikis la leĝojn kaj la principojn de la estaĵoj en la mondo, senhalte babilante, sed li sentis sin ankoraŭ ne sufiĉe parolinta. Tial li aldonis abundon da pli absurdaj klarigoj. Li sopiris akiri grandan famon al si per venko super ĉiuj siaj kundiskutantoj, sed li ne estis akceptita de la ordinaraĵoj. Malforta en sia virta kulturiteco kaj forta en la studado pri eksteraj estaĵoj, li sekvis vojon mallarĝan, zigzagan.

El la vidpunkto de la Taŭo de la ĉielo kaj la tero, la kapablo de Huizi estis tiel sensignifa, kiel la vana laboro de la moskito aŭ de la tabano. Liaj argumentadoj neniel kontribuis al la homa kompreno pri la estaĵoj en la mondo. Se la klereco de Huizi estas rigardata en kelkaj aspektoj, li povas esti kalkulata kiel sufiĉe multescia. Sed koncerne la aliron al la Taŭo, li ja iradis en la kontraŭa direkto! Anstataŭ fiksi sian menson sur la ĝusta komprenado de la mondo, li senlace malŝparis sian tempon kaj energion por akiri al si la renomon de lerta retoriko. Kia domaĝo!

Huizi estis homo talenta, sed li erarvadis sur la malĝusta vojo, kiun li prenis

por vojo kondukanta al la Taŭo, kaj li vane postkuris ĉiujn estaĵojn ĉiam sen reveno, same kiel homo penanta silentigi la eĥojn per siaj krioj aŭ penanta kuri pli rapide, ol lia ombro. Kia tragedio! (**Fino**)

*Elĉinigris*



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

**Ĉineske**

**Yi Qiao (Ĉinio)**

*Korinklina amo*

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu\**

Via kiso tenera

vervas sincera.

Oni brakumas en mut'

kun reciproke kora salut'.

Gracumo sinforĝesa'ondas karesa.

Estingiĝos ne l' sanktflam'

nek korinklina delice am'.

\* *Belulino Yu (ĉine: Yumeiren) ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.*

**Fervorespero**

— laŭ ĉinesko *Kora sento\**

Flagras fervorespero:

sur nia tero

harmonio regos

sen hommizero.

Kun pia

sincero

laŭ vero

ni fortstrebu

por mondopaco

ĝis konkero!

\*Kora sento (ĉine:suzhongqing): ĉina fiksfirma  
poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj respektive de  
7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa /  
xa,a,xxa (x=senrima)

## Vejdo (Ĉinio)

### Elegio pri falantaj folioj

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*

Aŭtuna  
vento blovas jen.  
Arboj skuiĝas forte,  
folioj falas kun ĝem'  
triste ja en trem'.

Brunflavaj  
folioj tere  
kuŝas morte senmove  
aŭ flirte en-aere  
falas despere.

Folioj  
kelkaj mizere  
falas en riverfluon  
kaj drivas neprefere  
ĝene iele.

Folioj  
kelkaj senforte  
descendas en marĉejon  
kaj baraktas tre morte  
ja malbonsorte!

Folioj  
tiuj sur tero  
piedpremataj de homoj  
knaradas en sufero  
en ĝojmalhelo.

Vetero  
jen tagon post tag'  
malvarmiĝas senhelpe.  
Folioj flosas en lag'

froste sen reag'.

Folioj  
kuŝas ja sur ŝlim'  
en marĉeja litego.  
Ili ĝemas kun deprim'  
laŭ mava destin'.

Alvenos  
vintro frida.  
Kiel ili ja vivus  
en sfero la perfida  
sub vent' senbrida?

## Jadranka Miric (Serbio)

### Diru ne al milito

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*

Memoroj  
kaj sopiroj tre  
premas animon, ĉu ne?  
Tamen dolĉajn ni nepre  
sonĝas denove.

Militoj  
ne nur ŝanĝigas homon  
fizike. Tamen psike  
daŭrigas resaniĝon.  
Do, vivu paco!

Doloro  
ne pasas. Longe  
daŭras fi-propagando  
altrudi fiojn lange  
aŭ rekte sange.

Ĉi mondo  
nun ŝanĝiĝas tre  
rapide. Eble mondo  
evitos fiojn . Vere  
mi ne kredas. Ve!



## Ĉirkaŭ mi

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*\*

Tilia  
arbo ne vole  
akceptis svingadon de  
vento kiu ludrole  
ĝuas tutsole.

Kolombo  
forflugis ĝue.  
Grizaj nuboj ne timas  
ĝin. Ĝi kveris unue.  
Noktiĝis frue.

Kolombo  
flugis al birdar',  
kiuj nestis sin kune  
kaŝitaj en la branĉar',  
sur la foliar'.

Surprizo!  
Baldaŭ estos tri  
en kolombo famili'.  
Ĝue alten flugi ni,  
al ĉiel' miri!

En ĉiel'  
aperis drako!  
Elsendis ĝi fajretojn  
el longa granda sako  
kun brua grako!

\**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo *xa,xa,a* (*x=senrima*).

## Laimundas Abromas (Litovio)



## Ĉu mi ne plu verku?

Antaŭ nelonge en la urba Esperanto-klubo okazis jarkunveno, en kiu partoprenis ankaŭ

mi. Kunvenis nekutime multe da geklubanoj kaj gastoj. Ĉiuj tumultis, bruis, babiladis kaj atendis malfermon de la kunveno kaj raporton de la prezidanto pri kluba agado. En la mezo de la kunvenejo grupiĝis la veteranoj de loka Esperanto movado: ekslibrotenisto Beno, geinstruistoj Mateo kaj Elena, kudristino Agota, frizistino Veronika, komercistoj Staseo kaj Sonata, bestkuracisto Adamo, poŝtistino Ruta, fervojisto Tadeo. Eĉ la eksbibliotekisto Albino, ne edziĝinta, malsanema ĝibulo, eĉ tiu venis. En unu angulo de kunvenejo tumultis gejunuloj, kiel ĉiam gajaj, kriemaj. Junularo estas nia estonteco. Bravuloj! Jen studento Paŭlo, li estas iniciatema, aktiva. Li vere iam iĝos klubgvidanto. Jen, ni vidu medicinistinon Oksana, ŝi meritas laŭdon pro la aktivado. Dum la jarkunveno oni povas renkonti malnovajn geamikojn, konatiĝi kun novaj, interŝanĝi la sperton. Tio estas la okazo por elkore interrilati, eksenti amikecon, komunecon, refreŝiĝi. Tamen mi hontis kontraŭ geamikoj, ĉar mi primokis, priridis ilin en miaj humuraĵoj.

Kluba prezidanto Salomono interparolas kun vicprezidanto Dominiko, sekretariino fraŭlino Inita, kursgvidanto Mikaelo, kasistino Filomena. Tamen ne kun mi. Ili ne ŝatas min, ĉar mi priskribis ilin, primokis en miaj humuraĵoj. Sekve mi trafis! Tio estas bona! Vicprezidanto Dominiko ridas, kluba gvidanto Salomono ŝajnigas, ke nenio okazis. Nur kluba sekretariino fraŭlino Inita provas alparoli min.

—Ho, kion mi vidas. Saluton Lajmundo!

—Saluton, Inita, —resalutis mi.

—Vi pro kio ekscitiĝas, nervoziĝas, timemas? —scivolas ŝi.

—Estas por tio la kaŭzo... — ne kuraĝas mi.

— En kio estas la afero? — ne ĉesas demandadi Inita.

Mi ĉirkaŭrigardis, ĉie abundis geklubanoj.

—Ĉi tie multas geklubanoj, mi ĝenas min paroli. Vidu vi, kiom da nekutime multas geklubanoj, — mi montras permane dekstren-maldekstren.

—Ho jes, mi komprenas. Ni iru flanken, — parolas Inita kaj montras angulon de la kunvenejo. Ni iris tien. —Ho, jen... ni estas solaj. Do pro kio vi ekscitiĝas, timemas?

—Kaj vi estus nervoziĝinta, ekscitema, kiam vi agadas, laboras, penas, tamen vin neniu taksas. Mi esperis ricevi laŭdon, rekonon, tamen oni mallaŭdis min, blasfemis, —eksciteme mi parolis.

—Do jen! Kaj vi diras, ke oni vin ne taksas, —parolis Inita kaj okulsignis, —Vidu vi, ĉar vin oni taksis.

—Mi konfesas, ke lastatempe mi tentis min kritiki, primoki geesperantistojn en miaj humuraĵoj.. Mi miras mem, pro kio? Ĉu tio indas, necesas? —parolis mi kaj provis pravigi min.

—Mi konvinkiĝis, ke jam tedis al ni legi viajn humuraĵojn, kaj al vi — verki pri geklubanoj, ĉu ne? — ekridetis fraŭlino Inita kaj denove okulsignis. — Altrudiĝas la impresoj, ke certaj aŭtoroj verkadas nur por si mem, pro privata plezuro, pro intelekta ĝuo aŭ pro literatuta ambicio, ĉu ne?

Oni povas rigardi kaj ne vidi, oni povas aŭskulti kaj ne aŭdi. Mi rigardis ŝin kaj esperis ekaŭdi ion alian. Sed kion?

—Mi pensas pri tio, ke en literaturon ĉiu verkemulo venas laŭ sia propra maniero. Iuj entute ne venas, — mi provis pravigi min.

—Ni legante freŝigu kaj riĉigu niajn lingvokononj. Ĉar legado aŭtomate estas aventuro. Eĉ se oni legas ne en Esperanto.

— Vi ne plu verku, ĉar neniu legas, — kontraŭdiris sekretariino fraŭlino Inita. — Neniu bezonas viajn verkojn. Kaj por vi nek mono, nek honoro. Mi pri tio certas. La eldonado en Esperanto ĉiam pli magras pro mizera konsumado. Abonado de esperantlingvaj periodaĵoj ŝrumpas senhalte.

— Sed pro kio skrapbruas la plumingo, pro kio knaras skribiloj, pro kio zumas la metala cerbo de la komputiloj, pro kio klakas la muso kaj klavaro? Kiucele, nome, pro kio okazas tiu bruado kaj anima konfuziĝo? — mi ne cedis kaj kontraŭ argumentis al sekretariino Inita.

— Pro tio, ke vi havas nenion por fari, — respondis sekretariino. — Tio estas ambicio, nebulo de la intelekto. Tio estas la riproĉo kontraŭ Dio. Pro kio vi turmentas nin? Vi brulos, ho ve, brulos vi en la fajroj de la infero pro viaj verkadaj pekoj, vere vi brulos. Kaj dubinde sukcesos estingi tiun fajron per tiu akvo, kiu estas verŝata el viaj verkaĉoj. Kvankam ĝi abundas. Do, vi ne plu verku, ĉar neniu volas legi.

—Interalie, neniu min demandis, tamen mi diros. Do, ne estas tio sama —la rondo de legantoj kaj eldonkvanto de la verkaĵoj. Kiel legantoj, sufiĉos por mi eĉ kelkaj personoj, ekzemple, la anoj de eta Esperanto klubo, kelkaj ŝatoj en interreto.

—Aŭskultu, Lajmundo. Oni verkis tiom da verkoj, skribis tiom da linioj, ke ĉio tio abundas kiel la maro, kiel oceano. Por ke esperantistoj povu legi, legi kaj ankoraŭfoje legi. Tamen ili ne legas. Ĥa, ĥa, ĥa! Mi ridas, —kaj fraŭlino Inita ekridis kaj denove okulsignis. — Fundamento — verkita, Enciklopedio — verkita, Verda Biblio — verkita, PIV — verkita, PAG — verkita, Sekretaj sonetoj kaj eĉ Ŝirpecoj ankaŭ verkitaj, Verdkata testamento kaj Samideanoj — verkitaj, Hura..., Krestomatia... Kio ankoraŭ estas verkitaj? Kio ankoraŭ mankas? Tamen esperantistoj ne volas legi. Kaj la rondo de legantoj ne povas finance subteni la eldonadon de esperantaĵoj.

Sekretariino Inita per siaj ĉarme verdaj okuloj demande rigardis min. Mi atente digestis ĉion diritan de ŝi. Dum mi silentis, ŝi parolis plu:

—Cetere, pro kio esperantistoj ankoraŭ legas periodaĵojn? De unua vidpunkto, tio estas mistero. Ĉu tio estas neceseco pri informoj? Ĉu vere?

— Koncerne informadon, necesas akre, eĉ tre akre paroli, —mi jam ne plu silentis. — Oni krias: informado, informado, sed ĉu ni scias, kio estas tiu informado vere? Mi persone scias, almenaŭ por hodiaŭ, nur du specojn de tiu vera informado: tiujn pri esperantistaj aranĝoj kaj trafika horaro. La bezono de tia informado estas alia, tuta alia afero.

—Sed kia? —ekinteresiĝis fraŭlino Inita. — Ĉu tio estas nur provo iomete legi, tamen esence — la sopiro foliumi? Tia nesatigebla, kiel deziro sin grati tie, kie jukas?

— Ili multon perdas foliumante, sed ne legante. Skandalan, priplorindan, kortuŝan, dolĉan, ridindan informadon... Ili multon perdas... Ĉu vi komprenas, kion mi volas diri?... Oni multon perdas, — mi parolis kun bedaŭro.

—Kiom da esperantistoj en la mondo komprenas Esperanton? Ĉu vi scias? — demande atakis min sekretariino. — Laŭ lastaj sciigoj en la mondo estas 2-3 milionoj da esperantistoj... Ni diru, duono de miliono —nur lernas kaj ankoraŭ ne legas, alia duono de miliono — ne plu legas, forgesis aŭ ne havas tempon por legi. Ni diru, ankoraŭ duonmiliono apenaŭ legas, ili ankoraŭ ne alkitimiĝis legi, pro tio kutime ili la librojn ne legas. Ni diru, ankoraŭ duonmiliono tiel kleriĝis, ke ion ajn ili ne legas. Nur specialan literaturon. Do ni jam havas 2 milionojn da esperantistoj, kiuj praktike ne legas. Ni diru, tiuj restintaj volas komputili: — serĉadi, vagabondi en la interreto. Ili klakas per komputilo, senkonscie, senmezure, senkaŭze.

—Mi ankaŭ povus serĉadi en la interreto, sed kion serĉi tie? — mi interrompis ŝian paroladon. —Mi ĉion necesan havas—

surtable – biero, „inko“ (komprenu vino), almanĝaĵo... Ĉio necesa — por verkada inspiro.

—Strangas la plendoj de kelkaj verkantoj, ke ne vendiĝas sufiĉe modestaj eldonkvantoj de iliaj verkoj, ke neniu ilin legas. „Sufiĉe“ mi uzas ĉi tie ne hazarde, sed intence. Sufiĉe modestaj tiuj verkoj lingve kaj enhance. — parolis Inita. — Unuvorte, ili estas frenezuloj, se havas tiajn pretendojn. Ĉimomente en Esperantio ĉiu verkas, kiu ne pigras, nome tiuj personoj, kiuj povus esti legantoj. Tamen ne mi juĝu. Ĉu vi komprenas, kion mi volas diri? Ja vi ne estas frenezulo, ĉu ne? Ĉu vi povas fari ion utilan por nia klubo? Mi rekomendas al vi, ne plu verku, ne plu primoku samklubanojn. Prefere vi sidiĝu inter la komencantoj kaj disdividu vian sperton, paroligu ilin. Komence tio ne estos agrable, interese. Tamen post la certa tempo vi alkitimiĝos kaj tio plaĉos al vi. Mi garantias, ke vi certe ricevos laŭdon. Ĉu vi samopinias kun mi?

—Mi eĉ ne pensis pri tio, —konfuziĝinte mi respondis al Inita.

Mi eksentis min malgrava, kulpa. Mi ekpensis profunde kaj enhance. Nur nun, kiam mi eksentis proksimiĝantan la finon de mia vivo, mi ekzorgis, kio estas la vivo mem, kaj evidentiĝis, ke mi ne scias. Ĉiam ŝajnis al mi, ke la senco de la vivo estas ĝi mem — la vivo, simple vivi. Kaj jen, nun klariĝis, ke mi ne scias, kion signifas tio — simple vivi. Malfacilas akcepti tion. Tiuj vortoj ofendas la personan honoron kaj dignon. Mi deziras malbeni la sorton. La sorton kaj aliajn gesamideojn, kiuj diktas la regulojn, pripensas la normigojn, postulojn. Unuvorte mi vivas ne laŭ miaj deziroj. Jam delonge venis la tempo por fari ordon, sentaŭgulojn ekstermi. Tamen tio malfacilas, ne simplas. Ho, Dio, vi scias pli bone ol mi, ke mi maljuniĝas kaj baldaŭ venos la tago de mia sunsubiro. Gardu min

kontraŭ la orgojlo ĉiuokaze ĉiujn instrui kaj kritiki. Liberigu min de la forta pasio priridi gesamideanojn. Mi ne plu havu literaturajn ambiciojn, nek pretendojn. Tamen tio al mi plaĉas, ke ĉio tio okazis.

—Bone vi diris fraŭlino Inita. Mi volonte okupiĝus pri aliaj aferoj, sed mi ne scias, de kio komenci. La aferoj de komencantoj ne estas por mi interesaj. Ili ĉiam promesas finlerni Esperanton, sed ne lernas ĝin. Ili venas al la lingvokursoj nur pro la portempaj kontaktoj kun la fraŭlinoj, — diris mi kaj profunde ekspiris.

Mian interparoladon kun sekretariino Inita ĉesigis kluba gvidanto Salomono. Ĉi momente Salomono salutis ĉiujn kunvenintojn kaj komencis jarkunvenon.

## Pipi (Ĉinio)



### La Legendo pri Sankta Arbo-dio

En suda Ĉinio estas vilaĝo nomata Banjano. Antaŭ la vilaĝo, proksimume en la distanco de kvindekkelke da paŝoj de ĝi, serpentumas rivereto, ĉe kiu kreskas tuberoplana granda banjano, alta je dekoj da metroj kaj dika je plurhoma ĉirkaŭpreno, kun granda kaj densa krono. La vilaĝanoj nomas ĝin sankta arbo-dio.

Jen estas la legendo pri ĝi.

Antaŭ tre tre longe en la vilaĝo iam vivis vidvino kun du filoj: unu nomiĝis Feliĉo, la alia Ĝojo. Feliĉo estis naŭjara, kaj Ĝojo estis je du jaroj pli juna kaj pli malalta je unu kapo ol Feliĉo. Ambaŭ estis tre petolemaj.

En somero Feliĉo kaj Ĝojo ofte estis ĉe la rivereto. Sub la banjano ili banis sin en la rivereto, ludis kaŝiĝon, faris transkapiĝojn, amuzis sin en akvo, kaptis fiŝojn kaj mano-en-mane petolis ĉirkaŭ la arbo. Se ili laciĝis de la ludado, surdorse ili etendiĝis laŭ sia tuta longo sur la herbejo punktita de buntaj sovaĝaj floroj kaj dormetis kapon ĉe

kapo en la ombro de la arbo. Ho, kia komforto! La loko ŝajnis al ili paradizo.

En la trunko oscedis truo, ĉirkaŭ unu kapon granda.

Iun tagon, Feliĉo kaj Ĝojo refoje venis sub la arbon. Apenaŭ ili alproksimiĝis al la trunko, proksimume unu paŝon for de ĝi, subite pafiĝis el la truo birdo, kiu brue frapante per siajflugiloj kaj en palpebruma daŭro sagis nesciate kien.

Ambaŭ eksaltis el sia haŭto de granda surprizo.

"Jen la birdo estas sur la branĉo!" diris Ĝojo, fingromontrante al Feliĉo la birdon starantan sur branĉo.

"Ja estas ĝi," ĝoje diris Feliĉo.

Ĉe tio, Feliĉo elpoŝigis katapulton kaj ŝargis per ŝtoneto, streĉis elastan rubandon posten, ekcelis la birdon kaj pafis. La birdo tuj falis teren senviva.

Ambaŭ freneziĝis kaj eksaltis de ĝojo.

"Kredeble en la truo estas io. Ni iru kaj rigardu, kio estas en ĝi," diris Feliĉo.

Granda scivoleco tiris ilin al la truo de la arbo.

Feliĉo antaŭe kaj Ĝojo malantaŭe, ambaŭ arkigante la dorsojn iris piedpinte al ĝi.

La truo troviĝis iom alte. Feliĉo povis apenaŭ atingi ĝin per la rigardo. Fine li devis starigi sin sur la fingroj de la piedoj.

Feliĉo alpremis sian vizaĝon al la truo kaj streĉante la okulojn rigardis en ĝin.

"Kion vi vidis?" kun okuloj suprenlevitaj al Feliĉo, Ĝojo senpacience demandis.

"Interne de la truo regas obskuro kaj nenion mi vidis."

"Enŝovu al vi la kapon en ĝin kaj atente rigardu," Ĝojo urĝis.

"La truo estas iom mallarĝa, ke mi ne povas enpuŝi mian kapon en ĝin."

"Lasu do, mi provu," Ĝojo petis.

Pro tio, ke Ĝojo estas je unu kapo malalta ol Feliĉo, por li estas des pli malfacile atingi la truon per la rigardo.

Ĝojo provis salton kelkajn fojojn, sed vane. Rompante al si la kapon, Ĝojo cerbumis kaj cerbumadis. Finfine saĝa ideo fulmis al li en la kapo.

Li transportis multe da ŝtonoj nesciate de kie kaj kunmetis ilin unu sur alian. Li stariĝis sur la ŝtonamaso kaj liaj okuloj facile atingis la truon.

"Kion vi vidis?" Feliĉo demandis lin.

"Estas tiel mallume, ke mi nenion povas vidi."

"Enŝovu vian kapon internen," Feliĉo aldonis.

Je tio, Ĝojo vere enŝovis sian kapon en la truon.

"Ĉu vi povas vidi?" Feliĉo demandis.

Estis nenia respondo. Post iom da tempo, subite en la truon eksonis obtuza korŝira krio:

"Helpon! Helpon! Helpu min!"

"Kio okazis? Kio estas al vi?" Feliĉo demandis.

"Mia kapo kojnumiĝas en la truon, tial mi ne povas eltiri ĝin eksteren!" respondis Ĝojo per trema voĉo.

Ĝojo falis en danĝeron.

Kion fari? Kion mi devas fari? Maltrankvila kiel formiko en arda poto, Feliĉo febre paŝadis tien kaj reen sub la arbo.

Sen alia rimedo, Feliĉo tuj ekforkuris ploranta hejmen kaj petis helpon de sia patrino.

De malproksime la patrino vidis Ĝojon pendantan ĉe la trunko. Kune kun Feliĉo ŝi kuris en la direkto al la arbo, tiel rapide, kiel ili povis.

La patrino tuj ĵetis sin al Ĝojo sur la talion, kaj eksplodis per larmoj ĉe la vido, ke sia amata filo troviĝas ĉe la rando de morto.

La patrino uzis ĉiujn rimedojn, sed ĉio vanis.

Fine la patrino abrupte ĵetis sin sur la genuojn antaŭ la arbo, kaj kunmetis siajn manojn kaj preĝis:

"Ho, Dio, kompatu lin se hazarde li senintence ofendis vin. Dio mia, bonvolu do

lin pardoni, senkulpiĝi, gardi kaj liberigi de mizero. ..."

Estas strange, ke la birdo, kiu kuŝis mortinta sur la tero, tuj reviviĝis kaj kun tirata akra ĉirpo kaj kun rapideco de sago flugis sur la arbon. Samtempe kun tio, Ĝojo eltiris sian kapon el la truon per si mem.

Ĝojo estis ekster danĝero.

"Dankon al la dia beno!" diris la patrino, kiu ridetis sub larmoj.

Sen ia ombro da dubo, la patrino kredis, ke la arbo havas en si ian dian forton, kiu benis kaj savis ŝian filon, kaj sentis, ke ŝi ŝuldis grandan dankon al ĝi.

La patrino tuj pafis sin hejmen, kaj baldaŭ revenis kun longa strio da ruĝa ŝtofo en la mano kaj ĉirkaŭligis per ĝi la trunkon de la banjano. Ŝi kategorie kredis, ke la banjano estas sankta arbo-dio.

De post tiu tago, unu fojon en ĉiu dua semajno la patrino kun Feliĉo kaj Ĝojo iris tien por bruligi al la arbo incensaĵon por ĝin danki pro ĝia beno al Ĝojo.

Tagon post tago, semajnon post semajno, monaton post monato, jaron post jaro, kun la tempo ĉiam pli kaj pli multe da homoj venas al la arbo por preĝi, por ke Dio benu ilin, iliajn familianojn kaj ĉion ĉe ili.

Nun la arbo aspektas pli juna kaj pli prospera ol antaŭe. Ĝi estas plene kovrita de ruĝaj ŝtofostrioj, similaj al pompantaj floroj, inter kiuj birdoj gaje ludas kaj melodie kantas.

Rilate la truon, ĝi nun ankoraŭ oscedas kiel antaŭe, kaj tra ĝi ankoraŭ libere flugas birdoj jen enen, jen elen.



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)

[www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm](http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm)

